

PREZO: 1.50 Kr.

MALGRANDA REVUO

Nro 2 • 1952

10a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
Esperanto en la ĉiutaga vivo, de E. Kuder- Mátéffy	33
Gajno de kartludo, de Hans Ruin	41
La malaperinta Justeco, de Wrthanes Papasian	44
Poemoj, de Marjorie Boulton kaj L. C. Deij ...	47
Pri la arto parodia, de William Auld	49
Debato	51
Literaturo	56

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperaa provizore kvaronjare. Prezo 1,50 kr. (inkl. sendkoston).
Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 5 rpk. —
S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 268023.

MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas
ilin afranko por resendo.

Perantoj

Belgujo: Belga Esperanto-Instituto, Oostenstr. 26, Antwerpen.
Flandra Esperanto-Instituto, Blankenberge Steenweg 72,
Brugge.

Brasilien: Brazila Esperanto-Ligo, Praça da Republica 54—1,
Rio de Janeiro.

Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth
(Herts).

Danujo: Libroservo de CDEL, Hörmarksalle 5, Risskov.
Esperanto-Foreningen for Danske Akademikere, Lakse-
gade 35, Kopenhago K.

Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.

Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol,
Paris X.

Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7,
(13 b) München-Pasing.

Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.

Israel: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.

Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.

Jugoslavio: Sro Kralj Drago, Rozna dolina 6—22, Ljubljana.

Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsehocht 181, Rotterdam Z.

Norvegujo: Esperantoforlaget AJS, Boks 492, Oslo.

Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nowa Sol.

Portugalujo: Sro A. P. da Silva, Rua 48 nro 7—3 Alvalade,
Lisboa.

Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.

Usono: Sro Arthur S. Kane, 725 B East Chevy Chase, Glen-
dale 5, California.

MALGRANDA REVUO

Nro 2

10a JARO

1952

Esperanto en la ĉiutaga vivo

De E. Kuder-Mátéffy

La temo traktata tie ĉi estas apenaŭ trovebla aliloke en
niaj presaĵoj, parte pro la ĝis nun malmultaj kazoj, kiam nia
lingvo devis servi kiel sola ebla komprenilo inter homoj en
daŭra kunvivado. Preĉipe la geedziĝoj inter esperantistoj de
malsama nacieco donas okazon elprovi almenaŭ por kelka tem-
po la kvalitojn de la helplingvo, ĝis la bezonoj de nepra inter-
kompreniĝo kun la ĉirkaŭmondo devigas al pli kaj pli plena
posedo de la enlanda lingvo. Tiu tempo varias laŭ la antaŭ-
kono de tiu lingvo kaj ne malpli laŭ perfekteco kaj amo, kun
kiu estas uzata esperanto mem. Preĉipe tio lasta povas efiki,
ke esperanto estas uzata dum jaroj post la nepra bezono.
La skribanto de tiu ĉi studo tute modeste pretendas troviĝi
en tia situacio. Li estas esperantisto de la komenco de 1906
antaŭ la dua UK en Ĝenevo, li havis la feliĉon en 1942 edziĝi
kun hungara, bonkonata esperantistino, lerninta nian lingvon
en 1929.

La donitaj cirkonstancoj devigis por tre longa tempo aplikon
de nur esperanto por la sennombraj bezonoj de la ĉiutaga vivo.
Tia ampleksa uzado elmetas nian lingvon al tre severa provo
kaj al la kritiko, kiel ĝi eltenas la komparon kun la naciaj
lingvoj, en nia kazo kun la hungara kaj la germana. La en-
havo de la sekvantaj linioj estas formita el niaj spertoj. La
legantoj certe ne tro miroj, se tiuj kondukos al la sincera
konkludo, ke la lingva materialo ĝis nun uzata en esperanto
ankoraŭ ne estas sufiĉa por egalvalori al la naciaj lingvoj,

kaj ke ĝi devas esti pli ellaborata. Instruitaj personoj en tia deviga situacio iel adaptas sian lingvan esprimilon al siaj bezonoj, unualinie utiligante tiujn eblecojn de la lingvo, kiuj ankoraŭ ne estas elĉerpitaj, kaj aldone kreas por si je sia propra respondeco iom el tio, kio ankoraŭ nepre mankas. En tiu lasta ago ne estas danĝero por la lingvo. Montriĝis ĝis nun kaj montriĝas, ke la ĝeneralaj lingvaj bezonoj estas en la familio la samaj por ĉiuj, kaj la evoluo iras rektan vojon. Lingvistaj konsideroj ne trovas eĥon ĉe la esperantista popolo.

Por jam de la komenco forigi suspekton, estu dirate, ke la gramatiko pruviĝis absoluta supro de perfekteco kaj senresta solvo de tiu ĉi flanko de la problemo. La diftongaj pluralfinajoj, kiuj estas la plej atakataj, perdas en ĉiutaga uzo ĉian pezecon kaj estas elparolataj facile kaj flue. Gramatika akuzativo, akordiĝo de la adjektivo kun la substantivo estas necesaj rimedoj por klarco kaj la libereco en la vortordo. Tiun liberecon ni nepre postulu, kaj ni nepre protestu kontraŭ lingvistoj, kiuj, diktante regulojn, celas kateni nin en lingvaj konvencioj. Ni pretendas, ke ni same prave rajtas diri "Mi al vi diras" kiel "Mi diras al vi". La lingvouzo por skribado, verkado, en kunvenoj, kongresoj kaj paroladoj, en kiuj okazoj ni formas niajn frazojn en ia mensa streĉiteco kaj singardo, estas alia ol la malpli pripensa, preskaŭ instinkta eldiro en familia vivo. Tial ofte aŭdiĝas frazoj kiel "Estas rimarkinda . . ."; serĉante la gramatik- kaj sencorilatan substantivon sed ne tuj trovante ĝin, ni daŭrigas: "kiel subite ŝanĝiĝas la aspekto". La formiĝinta regulo, ke en tiaj frazkonstruoj sole la adverba finaĵo estas ĝusta, donas kaŭzon al eternaĵ, nevolaj eraroj. Ni opinias, ke oni devus permesi ambaŭ formojn. Oni tamen povus diri, ke la mankanta substantivo estas anstataŭigita per la apudfrazo, kiu faras la saman servon. Adverbo post adverbo ne estas tre bela, kaj ankaŭ Zamenhof skribis: "estas naturo bona, ke . . ." Ĉe apozicioj ni estas eĉ devigataj dependigi la apudfrazon de la adjektivo anstataŭ de la adverbo, kiel en jena ekzemplo: "Mi juĝas bona, ke vi agis tiel." Estus troa postulo, ke ni en konversaĉioj ĉiam kuntrenu interligan substantivon, ekz: "Mi juĝas bona la fakton, ke . . ." sed ni ne insistas, skribe ni sekvas la regulon.

Unu ĉefan riproĉon, kiun ni devas fari al esperanto, ĉiutage uzata kiel sola lingvo, estas ĝia longeco kompare kun la naciaj lingvoj. Por verspoetoj tio estas problemo, senĉesa batalo en provoj de laŭversaj tradukoj. Por ni simpluloj ĝi estas nur malagrablaĵo. La tendenco en la lingvouzo estas kiel eble plej granda koncizeco de la esprimo. Ke nia lingvo senteble kontraŭstaras al tio, tion kaŭzas parte ĝia aglutina karaktero, principo necesa por internacia helplingvo. Ke Zamenhof mem konsciis pri tiu fakto, montras liaj propraj vortoj kaj reformproponoj 1906, kiujn li tre kontraŭvole cedis al tiama reformemo, en kiuj li eĉ estis preta kripligi sian belan tabelon de la korelativaj vortoj por ricevi pli koncizajn formojn. La tabelvortoj havas almenaŭ du silabojn, kvankam flue elparoleblajn. La naciaj lingvoj kontentiĝas parte per nur unu u, precipe por la plej uzataj. Tiun fakton ni povas kaj ne volas ŝanĝi. Sed en unu grava kazo ni povas nin tre facile helpi. La frazo "Tio estas vera" estas scsilaba. La franca kaj la angla uzas praktike nur du: "C'est vrai", "It's true". Per "jen", al kiu ni donas pli ampleksan signifon, ni povas redukti la maloportunan esperantan esprimon al: "Jen vera".

Alia ebla kaj oportuna mallongigo estas "ĉi". Ĝi estas nevaria. Tial ni povus uzi ĝin kiel demonstrativan artikolon, kiun servon ĝi jam nun kelkfoje plenumas, precipe en poezio. Do: homo, la homo, ĉi homo. La aliaj jamaj aplikoj restas tamen netuŝitaj.

Dua granda malkonvenaĵo estas la vortoj kunmetitaj kun "mal". Certe en 1887 Zamenhof devis tre ŝparsi la radikojn por logi al eklerno de la novaĵo. Hodiaŭ esperanto, kvankam ankoraŭ malforta, staras firme, kaj la tiamaĵ oble pravaj konsideroj de la kreinto perdis sian gravecon, dum la maloportuneco de tiuj longaj vortoj restas. Ili ĝene aperas ĉefe en ĉiutaga parolo kaj precipe ĉe verboj. Ofte oni volas aŭ petas, ke estanta stato ŝanĝiĝu en la malan. En nia menso antaŭregas la penso "mal"-igi ion. Kelkfoje aŭdiĝas jena bela eldiro: "Kie la mantuko? Mi volas malsekigi la manojn." Estas sentebla forta trablovo en la ĉambro: "Mi petas, firme malfermu la pordon!" En tiuj okazoj estas akcentata la prefikso, kontraŭ la regulo, kaj same ĉe kontraŭmetoj ekz.: "Ne gran-

dan, nur malgrandan pecon, mi petas! Ridindajn misdirojn kaŭzas kelkfoje "dekstra" kaj "maldekstra". Ĉe aliaj tiaj vortoj restas ĉiukaze la plilongeco kompare kun la respondaj naciaj vortoj. Kelkfoje la ŝparado de radikoj estas decidite troa. Gis antaŭ nelonge ĉiu oklornanto devis scii, ke la diversnacie bonkonata "rar" estas ne fundamenta propraĵo de esperanto sed devas esti reproduktata per "malofta". Tiu limigo estis des pli plendinda, ĉar "malofta" esprimas nur la neoftecon, dum "rar" povas esprimi ankaŭ la valoron.

Kontraŭe estas plej ofte necese diferencigi "maljuna" de "malnova". Radiko, kiu redonas ambaŭ sencojn, estas rekomendinda. Por ĝi preskaŭ trudiĝas la angla "old". Se oni tamen intencas esprimi la du iom malsamajn sencojn, restas ĉiam la kutima formado. Ankaŭ la vorton "trista" por "malgaja" ni renkontas jen kaj jen kaj mem uzas. La peza "malproksima" estas kelkfoje anstataŭigata per "fora". Ofte ni diras "ferna" (el la germana). La proponita "lontana" ne bone taŭgas por kunmetaĵoj. Estas tro primitiva procedo por kompletigi la materialon de esperanto, ĉiam simple preni latinidajn radikojn, ĉu ili tiacele taŭgas aŭ ne.

Ni proponas uzi anstataŭ la adjektivo "malbona" la prefikson "mis" deklaranta ĝin adjektiva radiko. Do: bonvetero, misvetero — bonhumoro, mishumoro — bonfarto, misfarto ktp.

De literaturistoj venis proponoj por uzi rektajn radikojn anstataŭ kunmetaĵojn kun "mal". Ni plene konsentas al tiuj intencoj, se oni atentigas jenajn postulojn: unue oni ricevu ŝparon de almenaŭ unu silabo, eĉ se tiucele prezentigigas malpli internacia vorto, due ni klopodu per la novelektoj akiri favoran aglutineblon, kion ni juĝas grava vidpunkto. Jen klariga ekzemplo. Ĉu proponi "kurta" ĉu "breva" por anstataŭigi "mallonga"? Ni apudmetu: kurtvida, brevida — kurtfingra, brevfingra ktp.

Ŝajnas al ni ne konsilinde, fari distingon inter signifo loka kaj tempa. Estas bedaŭrinde, ke ne ĉiuj neologismoj trovataj en novaj versaĵoj estas elektitaj laŭ tiuj vidpunktoj. Bedaŭrinda estas ankaŭ tio, ke eĉ fundamentaj substantivoj kaj adjektivoj, kiuj pro ilia signifo estas ofte uzataj en kunmetaĵoj, havas neoportunan aspekton. La plej malkonvena vorto de tiu

speco estas laŭ nia sperto "nigra". La kuntreno de interesa gramatika finaĵo ĉe adjektivoj estas ĉiam ĝena. Ni diras "blank-, griz-, blond-, brunhara", dum "nigrahara" malagrable elfalas el la serio. Preferinda estus ekzemple radikvorto "nera".

Tial ni ne konsentas pri "povra" por "malriĉa". "Povresanga, povrevesta" estas ne plaĉaj kunmetaĵoj.

Anstataŭ "malplena" prezentigigas "vaka". Por "malgranda" oni ne hezitu uzi "eta", kvankam gis nun tiu vorto entenas kelkfoje ankaŭ la flanksencon de "beleta". Por la latinidaj lingvoj ne ekzistas tiu problemoj, ĉar ili ne konas vortkunmetaĵojn kiel niajn. Ni do devas prudente elekti tion, kio plene adaptiĝas al nia libera vortuzo.

La ĝisnunaj kunmetaĵoj kun "mal" tiel perdos sian ekskluzivecon, sed ĝuste tial, aplikataj en konvena loko, faros nian lingvon pli riĉa. El estinta manko fariĝos avantaĝo. Tion pri tiu parto de la esploro.

Kvankam ni nin tre retenas en aplikado de formoj ne ĝenerale adoptitaj, ni tamen permesas al ni diri ekzemple "morgmatene, hiertagmeze".

Kiel nepre necesan novan verbon ni uzas "puci", el la germana "putzen", france "nettoyer", itale "pulire". La skribaspekto estas por germano stranga, sed ankaŭ verboj kiel "fuŝi, ŝati, ŝpruci" kaj aliaj malproksimiĝas aspekte de la origino.

Aliaj liberecon, eĉ pli tranĉan, ni enkondukis en nian lingvouzon, traktante kelkajn verbajn radikojn kvazaŭ ili estus substantivaj. Dom- kaj ĝardenlaboroj instigis nin anstataŭ la pezaj "hakilo, segilo, plugilo, rabotilo, pumpilo, ŝovelilo" diri konforme al la naciaj lingvoj la pli simplajn "hako, sego, plugo, raboto, pumpo, ŝovelo". Tiuj formoj kiel substantivigitaj verboj neniel povas nin interesi, ili restas neuzataj. Al la diritaj vortoj ni povas aldoni "kombo" anstataŭ "kombilo", sed cetere la nombro de tiaj pli koncizaj vortformoj estas limigita. La senpera laborefiko de la supraj vortoj estas esprimebla ne per la sama solstara radiko. Kontraŭe, la rekta efiko de fajfado estas fajfo, per helpo de fajfilo, k. s., sed la efiko de plugado estas turnita tersurfaco, tiu de pumpado levita fluidaĵo.

Teknike estas bezonata, ŝajne, la esprimo "boro" por marki

la specon aŭ kvaliton de la laboro farita per la "borilo". Ni nur devas konsenti, ke "segeroj" kaj "raboteroj" estas eroj el la laboro sed ne de la iloj. Ankaŭ kulturhistorie ŝajnas pli ĝuste devenigi la vortojn de la pli artaj laborometodoj de la inventita instrumento sed ne de ties agado. Nur la plej simplaj, por tiel diri naturdonitaj laboroj kaj agoj rajtigas verbajn radikojn: bati, ĵeti, piki ktp. Por ekzempligi tion, ni citu kelkajn komparojn el la germana: stossen (puŝi), Stoss, Stös-sel — schlagen (bati), Schlag, Schlägel, ktp.

Jam de kelkaj jaroj montriĝas inklino envenigi "alia" en la tabelon de korelativaj vortoj kaj formi ekz. "aliu, aliam". Ke la verkistoj ne kuraĝas fari en tio decidan paŝon, kvankam la praktikeco estas nedubinda, pri tio kulpas verŝajne timo pri ebla miskompreno inter "al lu" kaj "aliu". Ĉu tiu danĝero estas tro granda por permesi komune akcepteblan entabeligon, tio estas temo por lingvista detala esploro. Ni uzas "aliu, aliam", kaj nekorekte "alie" en senco kaj loka kaj maniera, en la lasta kazo anstataŭ "aliel" nur pro neelŝirebla kutimiĝo al la ĝenerala uzo. Se estus donata por "alie" anstataŭa vorteto, ekz. "sus" (germana "sonst"), ni klopodus rapide fortiri nin de prava riproĉo, ke ni fuŝas.

Por iri al alia temo ni citu alian liberecon rekomendindan. Laŭ paragrafo 3 en la Fundamento la vorteto liganta komparojn estas "ol", videble prenita de la germana "als". Zamenhof uzis do tiun vorton singarde laŭ la germana regulo nur por komparoj inter "pli" kaj "malpli", por ke lingvistoj ne povu lin riproĉi pri miskono de la germana aŭ eĉ pri manko de ĝenerala lingva sento. Ĉar germane la interliga vorto inter komparoj samgradaj estas "wie", Zamenhof skribis ĉiam, por doni ekzemplon, "li estas same granda kiel kiel mi." Tiam diferencigon konas nek la franca nek la angla, kaj verŝajne ankaŭ pliaj lingvoj, kaj ne necesas, ke ni ĝin faru en nia esperanto, kiu prenas sian materialon de diversaj flankoj sed ĝin aplikas laŭ propra volo. Ni do permesu al ni la frazeton: "Li estas same granda ol mi".

Nia radikoj "delikata" estas ŝarĝita per tro da signifoj. Por ĝi okazus malplipeziĝo, se ni enkondukus helpe al ĝi radikojn, kiun ni jam konas en simila formo en multaj nacilingvoj, nome

itale "fino", france "fin", angle "fine", germane "fein". Por ĝin diferencigi de la esperanta "fino" prezentiĝas la du solvoj "fajna" aŭ "fejna", el kiuj ni aplikis la lastan pro la ĉarma vortludo "fejna-feina". Senteble mankas en la ĉiutaga vivo ankaŭ radikoj por esprimi la signifon de la franca "fade", germana "fad", angla "stale", itala "insipido". En kazo de ĝenerala bezono ni petas pri interkonsento pri la nova esperanta vorto "fada".

Certe ne plaĉas al multaj samidcanoj, ke ni en diversaj parolturnoj diras ekz.: "Se ni farintus tion ... agintus ... estintus pli bone" anstataŭ la kutimajn esprimojn. Sed la tento estas tro granda, kie tiaj formoj prezentas al ni glatan parol-fluon. Efektive la esprimo "estus estinte pli bone" estas tiel peza kaj neplaĉa, ke oni apenaŭ renkontas ĝin en la literaturo. Ni vere ne vidas gravan kaŭzon por senigi nin de tia ebleco. Apud "jen jam farita" ni diras ankaŭ "jam faritas".

Mi povus nun fini, menciinte proksimume ĉion, kio restas ankoraŭ interne de la limoj de la Fundamento, al kiu Zamenhof strikte tenis sin "malgraŭ oftaj tentoj", kiel li mem konfesis. Estus tre interese ekscii, de kia speco estis tiuj tentoj. Ke ili tuŝis la gramatikon, tion ni ne kredas laŭ niaj plej bonaj spertoj pri ĝi, malgraŭ liaj tre malvolonte ceditaj reformproponoj, inter kiuj troviĝas kelkaj vere nekompreneblaj. Ni do konjektas, ke tiuj tentoj rilatas nur la vortaron de la Fundamento. Ĉar ni ne kapablas plu juĝi tiun parton sankta kaj neŭŝobla libro, sed aliflanke ne intencas kaŭzi skandaleton inter la esperantistoj, ni nur aludas kelkajn ŝanĝojn, kiuj estos dezirindaj, kiam nia esperanto devos grandmezure servi kiel parolata lingvo. Ni komprenas ŝanĝojn en tiu konata senco, ke estu apudmetataj pli taŭge elektitaj vortoj malaperigantaj laŭ la paso de la tempo la praaĵn. Do nur kelkaj provetoj:

Kiel plendinda estas edzino, kiam ŝi en la kuirejo ankaŭ lingve devas okupi sin pri pieto, plado, plato, pato, pota, pelvo.

Samkategoria estas la sonsimileco inter "atentu" kaj "atendu". Por estri la densan stratrafikojn en urbo ambaŭ vortoj estas ofte necesaj. Miskompreno povas montri sin vivdanĝera.

Tria samspeca ekzemplo estas "jes" kaj "ne". Provu nur

komprenigi vin per ili, vokante el distanco de kelkaj dekoj da metroj, kaj vi konvinkigos, ke la interesa aero forglutas la konsonantojn. Certa percepto ne eblas. Oni povas facile helpi sin per "ja" anstataŭ "jes". Simila problemo prezentas la nombroj "ses" kaj "sep". Tre maloportuna montriĝis "pezi" apud "pesi", mi ripetas, en familia vivo. Kiam nia lingvo estas parolata en aliaj okazoj, tiu fakto ne sentigas.

Tiuj malmultaj aludoj sufiĉu. Ili estas makuloj en belega tuto sed ĝuste tial dolorigas. La ĉefaĵo estas, ke la esperantistoj konsciu, ke nia lingvo havas ankoraŭ kelkajn neperfektaĵojn en la vortaro, kiam ĝi devas funkcii kiel sola daŭra interkomprenigilo, kaj vera amo al ĝi provas forigi ilin. Do kelkaj saĝe elektitaj neologismoj estas bonaj, se ili, ne tro respektante plejan internaciecon, sekvas la ĉefprincipojn de pleja mallongo kaj aglutineblo.

Redakcia rimarkigo.

En la originalo la supra artikolo estas konsiderinde pli longa. Por povi aperigi ĝin, mi devis kiel eble plej multe koncizigi ĝin, forigante vortojn, esprimojn kaj frazojn, kiuj ne estas nepre necesaj. Sro Kuder-Mátéffy permesis tian koncentrigon. Tamen ĝi estas delikata kaj ne agrabla operacio, ĉar la esprimo kaj la prezentmaniero multloke perdis la personaĵn stiltraĵojn de la aŭtoro. Mi esperas, ke ĉio esenca en lia prezento tamen restas ankaŭ tie ĉi.

Persone mi ne estas konvinkita, ke sro Kuder-Mátéffy pravas, almenaŭ ne ĝenerale. Mi konas homojn, kiuj dum jaroj kaj jardekoj uzis esperanton kiel preskaŭ solan lingvon, do ankaŭ hejman, kaj ili neniel estis ĝenataj de la vortoj, kiujn sro Kuder-Mátéffy kritikis. Infanoj, kiuj lernis esperanton parole samtempe kun la gepatra lingvo aŭ ĉe kiel unuan, ŝajne ankaŭ ne spertis tian ĝenon, kaj ili ĉe ne intermiksas ekz. fermi kaj malfermi.

Kial mi do aperigas la artikolon? Eble ankaŭ aliaj pensas kiel sro Kuder-Mátéffy, kaj en tiu okazo estas bone, ke ni

komparas kaj ekzamenas niajn konceptojn kaj provas trovi la plej bonan sintezon. Eĉ se li estus sola, liaj vortoj meritus atenton. Se ili enhavas ion bonan, ni utiligu tion. Kaj ĉe se ĉio montriĝus nebezonata aŭ nebona, estus valore ricevi klaran koncepton pri tio.

Se iuj el la legantoj komentos la artikolon per kontribuo al MR, mi petas vin skribi koncize kaj kiel eble plej mallonge.

Fine mi atentigas pri unu afero, kiu ŝajnas al mi tre grava. Legantoj de la supra artikolo povas eventuale ricevi la impreson, ke estas dezirinde, ke ni en diversaj kampoj de ĉiutaga lingvouzo konformigu esperanton al la oportunaj esprimmanieroj de naciaj lingvoj kaj al la kapricoj de ĉiutaga babilado. Tia koncepto estus danĝera. Sanskrito kaj latino povis dum epokoj funkcii kiel komunlingvoj dank' al tio, ke ili estis lingvoj ne de ĉiutaga ĝenerala uzado. Eĉ supraĵa scio pri estigo kaj ŝanĝigo de ĉiutage kaj ĝenerale parolataj lingvoj instruas, kio okazus ankaŭ al esperanto, se ĝi farigus la sola aŭ ĉefa lingvo de granda nmaso da homoj. Tia danĝero ŝajnas malproksima. Sed estus same danĝere, se multaj esperantistoj komencus trakti esperanton, kvazaŭ ĝi estus tia lingvo. Por ke esperanto povu plenumi sian funkcion, ĝi devas esence esti kaj resti lingvo internacia.

Gajno de kartludo

*De Hans Ruin**

El somero en la fino de la 90aj jaroj mi memoras la patron de mia patro, kiam li estis ĉe ni sur nia insuleto en la arkipelago. En kvietaj vesperoj li horon post horo sidis sur faldseĝo sur la boatponto kaj per vergo fiŝis perkojn el la densaj fukarbaroj apud la pontokesto. Mi vidas ankoraŭ lian blankan barbon kaj lian afablan rigardon sub la pezaj maljunulaj palpebroj. Ĉirkaŭ la kruroj li havis plejdon, kaj la fadenon li jetis per longaj, nerapidaj jetoj.

* Vidu en nro 1/52. Tiu ĉi rakonto estas el "Revŝipo en sekdkoko", aperinta pasintvintre. Traduko de S. Engholm.

Pro multaj kaŭzoj fiksiĝis en mia memoro la bildo de la maljuna viro en la perfekta paco de la somera vespero. Eble antaŭ ĉio pro tio, ke oni baldaŭ rakontis al mi historion pri li, kiu ŝajnis noreala kiel mito kaj en stranga maniero kontrastis kontraŭ la impresoj, kiun li lasis al mi.

Kiel juna oficiro en la servutotempa Ruslando mia avo iun vintran vesperon en la fino de la 50aj jaroj partoprenis kartpartion en bieno proksime al la regimenta urbo Susdal, ne malproksime de Moskvo. Oni daŭrigis sufiĉe longe, kaj la gastiganton-bienposedanton persekutis persista malbonŝanco. Li forludis sian kontantan monon, sed la kartludon li ne volis ĉesigi. Kiel enmeton por la daŭrigo li donis junulinon, kiu estis servinta al la sinjoroj per kafo kaj likvoro kaj cigaroj. Sed Fortuno ne favoris lin. Li perdis la partion. Noktomezo proksimiĝis, kiam la gastoj adiaŭis kaj la sledoj venis al la perono. Tiam la knabino staris en la halo kun ligaĵo kun vestoj en la mano, preta por sekvi sian novan posedanton. Sub la malvarmaj vintrosteloj de Ruslando ŝi en la sledo de mia avo estis kondukata al nova kaj necerta sorto.

Sed en la finnlanda oficira hejmo estis tute alia rilato inter sinjoroj kaj servistoj ol en multaj tiamaj rusaj altrangaj familioj. En la nova hejmo Avdotja Grigorevna fariĝis ia ĉio por ĉio. En la malgranda knabo, kies prizorgon oni konfidis al ŝi kaj kiu poste fariĝis mia patro, ŝi trovis dankeman objekton por sia granda provizo da amemo. Mia patro kutimis diri, ke li ne povis imagi sian hejmon sen sia kara vartistino aŭ "njanja", kiel la rusoj diras. En malgranda notaĵo li rakontas, ke la gefratoj ofte provis decidi, kiun ili plej amas, sian patrinon aŭ njanja. Estis ŝia gepatra lingvo, kiun li lernis kiel unuan, ŝi kantis al li siajn rusajn popolkantojn, ŝi ricevis liajn konfidojn, dividis kun li liajn unuajn afliktetojn kaj senluziigojn. Avdotja estis egala al tiu njanja, kiun Puŝkin kun tiom da amo eternigis en sia fama versromano Eŭgeno Onegin, la bona kaj prudenta nutristino de la bela kaj malfeliĉa Tatjana. Kiel ekstera memorigo pri ŝia signifo en la vivo de mia patro

restis en lia sveda elparolo tra lia tuta vivo neforta rusa akcento. Kaj kiam li kiel rektoro de la universitato dum la lastaj jaroj de la cara rusa perforto devis intertrakti kun la rusaj aŭtoritatoj pri instruistoj kaj studentoj, kiujn la ĝendarma institucio metis en malliberejon, li sukcesis pli ol unu fojon mildigi ilian sorton dank' al sia perfekta scio de tiu lingvo, kiu estis la unua kiun li lernis — estis Avdotja, kiu, nevidebla, de la alia flanko de la tombo, ankoraŭ etendis helpan manon inter rusaj karceraj muroj. Kiam li fine longan tempon post tio estis preta pri sia vivo kaj kuŝis mortanta — tiam li estis rekondukita pli ol okdek jarojn en la tempo. Estis la lingvo de sia njanja, kiun li parolis en sia deliro.

En la fruprintempo 1861 miaj gepatroj loĝis en malgranda urbo proksime al la niatempa Stalingrad, la tiutempa Caricin. En dimanĉa mateno en la fino de februaro mia avo diris al Avdotja, ke ŝi surmetu siajn plej bonajn vestojn kaj iru en la preĝejon — tie ŝi ekscios ion, kio tre multe rilatos al ŝi. Li sciis, ke oni laŭtleĝos de la katedro la imperiestran manifeston pri la ĉesigo de la servuto, Avdotja foriris, nescianta pri tio, kion ŝi ekscios. Ĉiuj atendis streĉite sian revenon. Ŝi venis, sed kun la vizaĝo lavita de larmoj. Ŝi ekĝenuis kaj ĉirkaŭbrakis la genuojn de mia avo kaj petis, ke ŝi povu resti. Ŝi interpretis la aferon tiel, ke libero signifas, ke ŝi devas forlasi la familion, ĉe kiu ŝi sentas sin hejme kaj kiel libera homo serĉi sian vivtenon en libera mondo.

Troviĝas multaj momentoj en la pasinto, en kiuj ni volus kunvivi. Mem mi scias apenaŭ ion alian, kion mi pli dezirus kunvivi ol ĝuste tiun momenton, aŭ pli ĝuste la momenton, kiu sekvis tiun, kiam fariĝis klare al Avdotja, kion libero efektive signifas. La libero signifas, ke ŝi ne plu estas ligita de deviga leĝo sed nur de la inklino de sia koro. Pro libera propra volo ŝi povis resti en tiu hejmo, kiu fariĝis ŝia propra.

Ne estas strange, ke ankoraŭ restas ĉe mi la bildo de mia avo sur la faldseĝo kun la plejdo ĉirkaŭ la kruroj kaj la fiŝvergo en la mano. Inter alie ĝi donis al mi memorigon pri la relativeco de niaj konceptoj pri la tempo. Ŝajnas al ni, ke longa tempo pasis post la ĉesigo de la servuto en Ruslando, sed ĝi estas pli mallonga ol ni imagas, kaj tio klarigas multon en la hodiaŭa rusa historio.

La tempo rapide rajdas. La homoj saltas sur la selon kaj baldaŭ desaltas, kvazaŭ temus nur pri leciono en la arto kunrajdi iom da vojo. Sur nia insuleto en la Finna golfo ni loĝis nur iom pli ol kvindek jarojn, sed jam kvin generacioj iris sur ĝiaj vojoj kaj vojetoj kaj paŝis sur la mirtela kaj vakcinia arbustotapiŝo en la arbaro. Mia avo, mia patro, mi mem, miaj infanoj, miaj nepoj. Mia avo estas antaŭ longe mortinta, same estas ŝi, kiun li kondukis kun si post nokta kartludado. Ambaŭ ripozas en la sama tombejo en finna paroĥo proksime al Tavastehus. Kaj for estas antaŭ longe ankaŭ la malgranda knabo, al kiu ŝi iam instruis sian lingvon, kaj por kiu ŝi kantis siajn popolkantojn.

La malaperinta Justeco

De Wrthanes Papsian

Okazis iam, ke la Justeco subite malaperis. Tio ne estis la unua fojo, ke ĝi malaperis.

Por eviti la homojn, kiuj ĝin turmentis, ŝiris kaj puŝis tien kaj tien ĉi, ĝi ofte fuĝis inter la montojn aŭ sin kaŝis en la plej foraj anguloj de la mondo. Tamen oni sukcesis, iel ĝin rehavigi, firmteni ĝin en kaĝo aŭ kesto kaj uzi aŭ misuzi laŭ arbitro.

Sed tiun fojon — mi ne scias per kia miraklo — la Justeco sukcesis plene forsavi sin de la homoj kaj sin kaŝis tiel perfekte, ke ili sciis trovi ĝin nek per preĝoj kaj ruzoj, nek perforte aŭ helpe de oro.

Estiĝis konfuzego: vivi sen justo estis malfacile. Des pli, ke sekve de ĝia malapero pliiĝis multaj, por la homaro "utilaj" (aŭ oportunaj) statoj kaj eksceso, kiel hipokrito, senrajteco,

sangoverŝo kaj multaj similaj venenoj, kiuj prezentiĝis lerte maskitaj per la trompa ŝajno de justeco.

Jen unue nobela militisto postiris la spuron de la Justeco. Li kolektis grandan armeon, dividis ĝin en regimentojn kaj kompaniojn kaj juris, elserĉi la Justecon, kie ajn ĝi tenas sin kaŝite, kaj rekonduki ĝin ligita je manoj kaj kruroj.

Por plenumi tion, li ekstermis per sia militistaro urbojn kaj vilaĝojn, kovris montojn kaj valojn per sango, glave batfaligis aŭ frakasis ĉion vivan, esperante eltrovi la Justecon.

Poste viro tre riĉa entreprenis, serĉi la Justecon. Li ŝarĝis siajn kamelojn per oro kaj arĝento, per juveloj kaj altvalorajoj, fidante tiel sukcese. Oni diras ke li kunprenis ankaŭ kelkajn belajn virinojn, por kombini kun la brilo de la oro la ĉarmon de la beleco.

Vi vidos, asertis li multfoje, ke la Justecon mi aĉetos per mia oro, logos per la virinoj kaj alportos ĝin enŝlosita en mia kesto.

Tiel okazis ke la pugno de la perforto kaj la potenco de la oro eliris serĉi la Justecon. Ili iris kaj serĉis, kaj ili iras kaj serĉas ankoraŭ hodiaŭ.

Lasu ilin iri!

Nun ni vidu, kiu estas tiu tria, kiu same eliris por serĉi la Justecon. Estis mizerulo en ĉifonoj, sur lia frunto la sufero estis fosinta grandajn sulkojn.

La unua havis glavon, la dua oron. Sed kion havis la tria, la mizera? Kiamaniere do li pensis trovi la Justecon? Anstataŭ ĉiaj donacoj li kunprenis nur flakonon, kiun li tenis premata ĉe sia brusto. Kaj tamen li eliris kun la firma volo, ĉiuokaze trovi la Justecon.

La flakono estis plena de likvaĵo antaŭe ne konata: de la larmoj de orfo, de la ĝemoj de morte vundita soldato, de la amara ŝvito de laborulo. Per unu vorto: de ĉiuj suferoj kaj doloroj li estis eniginta iom en sian flakonon, li ĝin plenigis kaj fermis. Kaj li kredis, ke tiel li certe allogos la Justecon.

Do ankaŭ la malriĉulo prenis sian vojon. Li iris tra grandaj urboj ĝis en la plej malproksimaj kaj solecaj vilaĝoj. Li paŝis senlace, supreniris montojn kaj deiris malsupren en la valojn.

Oftfoje li haltis vokante: "Kie vi estas, Justeco?" Sed nenia postsigno de ĝi troviĝis, oni ne vidis kaj ne aŭdis ĝin.

Longan tempon la mizerulo migris, en ĉiujn direktojn, malsata kaj solfanta, laca kaj malĝoja. La flakonon li tenis ankoraŭ ĉe sia brusto, kaj ĝia enhavo jam komencis fermenti. Sed eĉ al tio la Justeco rilatis senkompatate. Ĝi ne malkaŝis sin kaj eĉ sian ekziston ĝi ne perfidis.

Fine, kiam malesperante kaj lacega la mizerulo estis alveninta sur la supro de monto, li sin sidigis sur roko kaj pripensis, ĉu ne estas vane, serĉi la Justecon ankoraŭ pli longe, ĉar kredeble ĝi evitas renkonti eĉ la mizerulon.

Tiel pripensinte, kun indigno li prenis la flakonon kaj ĝin jetegis kontraŭ rokon.

"Foriĝu kaj pereu!" li kriis, "Vanaj estas ĉiuj suferoj kaj larmoj, la Justeco ne ŝatas la mizerulon..."

Apenaŭ la flakono estis frakasita, kiam terura tondro sin aŭdigis. El la elfluantaj larmoj leviĝis densa fumo, kirliĝis kaj disturniĝis, kaj el ĝi kreskis giganta figuro. Terurite la mizerulo falis sur la teron. Jen la giganto per laŭta voĉo vokis al li: "Restarigu vin kaj ne timu!"

"Kiu vi estas, terura spirito?" demandis la mizerulo.

"Mi estas la Protesto", kriis la giganto, "mi estis naskata el la verŝitaj larmoj, kaj mi volas rekonduki en la mondon la malaperintan Justecon. Jen, rigardu!"

En la hela aŭrora lumo la mizerulo ree vidis la gigantfiguron. Ĝi rigardis supren al la altaĵoj, kie intensa fulmotondro furiozis tremigante la tergrundon.

Kaj en la malproksimo, kien montris la etendita mano de la giganto, oni vidis tra aperturo inter la nubaro la kaŝitan Justecon, tre ĉagrenita; ĝi tenis per la mano nek pesilon nek glavon.

"Venu ĉi tien, Justeco," vokis al ĝi la Protesto, "mi alestas, mia voĉo estu por vi pesilo kaj glavo; venu Justeco!"

Sed la Justeco rigardis ĝin rigide kaj malĝoje, kaj rigardante ankaŭ la mizerulon diris: "Ankoraŭ ne nun! Vi estas ankoraŭ tro juna. Iru, pluiru por kolekti pli da larmoj, pli da suferoj. Kresku en senfinan maron, muĝu kvazaŭ kolosa rivero. Nur tiam mi venos kun mia glavo kaj mia pesilo."

La nuboj ree kumuligis kaj la Justeco returne malaperis en siajn neatingeblajn altaĵojn.

De tiu tago la forta militisto serĉas la justecon en la sango, la riĉulo en la oro, sed la mizerulo atendas persiste en siaj suferoj. Li kreskigas per larmoj la Proteston, por ke tiu revoku en la mondon la forpasintan Justecon.

El la armena en la germanan lingvon tradukis A. Abeghian. La tradukaĵon esperantigis Josef Sommer.

El la ĉiumonata prikultura revuo DIE PFORTE, Port Verlag, Stuttgart-0 Dimershaldenstrasse 11. Prezo po kajero 1 germ. marko, se oni abonas por duonjaro.

"La heroo lukto progresas"

De Marjorie Boulton

Dum la mallumo, en Koreo,
falas usono junegulo;
kvazaŭ impona maŭzoleo
koto kaj ŝtonoj ĉirkaŭbrakis
lin per ironia gratulo,
dum junaj ĉinoj ekatakis.

Apud li juna ĉino falis,
piedpremita, vundoplena;
koto, mallumo lin vualis;
la batalbruo jam foriris,
kaj en la nova lum' matena
mortantaj homoj jam deliris.

Kaj tute fremda kaj barbara
ŝajnis al ĉiu ĉiu vorto
de la alia dudekjara
soldato, kiu diris: "Dio . . .
Patrino . . . Karulino . . ." Morto
tradukis, kaj silentis ĉio.

El ĉiu disrompita kapo
la memoritaj birdoj flugis
per nenecesa batalfrapo;
Amikoj memoritaj svenis;
La kosta sango koton plugis;
azian kampon ĝi venenis.

Sed junaj ĉiuj ĉi soldatoj
devis mortigi samajn homojn,
kaj ili estis junaj fratoj
kaj pro deliro nun forgesis
la homajn familiajn nomojn;
Tiel heroa lukt' progresis.

Respektu!

De L. C. Deij

La branĉoj kun la ora pluvo de citizo,
la ombra kaŝtanujo kun kandeloj,
sur luliĝanta fagopinto — emberizo.
Mi forgesis, ke troviĝas paradizo
inter domruinoj kaj subteraj keloj.

Kun malvarmetaj floroj sur la arda vango
profunde ĝuis mi, ĝis malgraŭvole
en mia febra kap' ekbruis penslavango:
paco, flugalarmo, suno, morto, sango —
Di', ho Dio! Kial ne beleco sole?

Por trovi pacon floro estus jam sufiĉa.
Komprenon donas birdaj idiomoj.
La mondo estas tiel bela, tiel riĉa;
Dio kreis ĝin, ke estu hom' feliĉa.
Donu Dio, ke respektu ĝin la homoj!

Pri la arto parodia

De William Auld

En Britujo (pri aliaj landoj mi ankoraŭ ne povis informiĝi) la parodiado de konataj kaj ŝatataj poemoj estas sufiĉe disvastiginta kaj populara fenomeno de la nacia humuro. Se oni tralegas anglalingvan antologion de humuraj versaĵoj (ni diru ekz-e "The Faber Book of Comic Verse") oni trovas, ke tiaj parodioj okupas tre grandan parton de la volumo. Almenaŭ unu posemajna revuo faras politikan komentarion per parodioj de konataj poemoj.

Tiaj parodioj estas ordinare senmalicaĵ, en la senco, ke ili plej ofte ne celas moki la parodiatan verkon; eventuala malico kaj satiro de la parodianto ĝenerale sin direktas kontraŭ io alia: nacia moro, aktuala modo, k. s., kaj la parodio mem estas nur rimedo por pliakrigi kaj plivigligi la satiron. Tio kompreneble ne estas centprocente valida; troviĝas ankaŭ parodioj, kiuj estas trafaĵ kritikoj kaj komentoj pri la poezio de la parodiato, ekz-e la tre fama kaj tre vigla parodio pri la poeto Wordsworth:

Du voĉoj estas: unu profundtrafa,
L'altra ave kaj kretene ŝafa.*

Sed kutime la parodiado estas speco de humuro bonhumora, kies fontimpulso estas gajanima sprito.

Estas interese, ke de tempo al tempo iu parodio povas fariĝi pli konata ol la originala poemo. Ekz-e, Lewis Carroll (la verkinto de "Alice en Mirlando" kaj "Tra la Spegulo") verkis multajn parodiojn, sed hodiaŭ la logantoj tre ofte ne konstatas, ke ili estas parodioj, ĉar la originaloj estas nun preskaŭ nekonataj, dum la parodioj eniris la popolan tradicion.

La tuta arto parodia dependas unuavice de la vasta konateco de la originala poemo. Ĉar krom la poemoj de la Majstro la esperanta poezio ne estas konata de la plimultaj esperantistoj, sekve parodioj estas tre maloftaj en la internacia lingvo. En ĉiu nacilingva lernejo la lernantoj ekkonas almenaŭ kelkajn

* Ĉar la parodio ne havus ĝeneralan intereson, mi tradukcitas nur du versojn. La originalo estas, kompreneble, soneto.

nacilingvajn poemojn, sed io simila ĝenerale ne okazas ĉe esperanto-kursoj. Se en esperantistaj enigmoj krucvortaj kaj aliaj oni devas trovi citaĵon aŭ verson el "esperanta poemo", oni scias tute certe, ke temas pri poemo zamenhofa (kaj tio tre faciligas solvon de la koncerna enigmo!). Malgraŭ tio, parodioj esperantaj ne tute mankas, kvankam pro nekonateco de la originalo la leganto verŝajne ne ĉiam konscias, ke temas pri parodio. En kategorio de "stilo"-parodioj registriĝas "Pri Somero" de Raymond Schwartz kaj pluraj "Rimportretoj" (pri ekz-e Barthelmess, Hilda Dresen, Hohlov, Miĥalski) de Kalocsay. Parodiojn de unuopaj poemoj mi konas jenajn: R. Schwartz (parodio de "La Polvohomo Meditas" de Baghy) kaj M. Beraru (parodioj de "La Vojo", "Sur Unu Kordo" de Grabowski, "Mi Kisas Vian Manon" de Kalocsay, poemoj de Baghy, Maria Hankel, Deŝkin, Dombrowski, Devjatnin, Schwartz, Simeonov kaj Olshvanger).

Mi estus tre danka se la afablaj legantoj konsentus sciigi min (a) pri la rolo de la arto parodia en sia nacia lingvo; (b) pri eventualaj esperantaj parodioj al mi nekonataj; (c) pri eventualaj propraj parodioj de esperantaj verkoj. Mia adreso: 23, Ashdale Drive, Mossbank, Glasgow, S. W. 2., Skotlando.

Mi aldonas sube unu parodion mian. Mi aldonas por komparo ankaŭ la originalon, kiu aperis en "Literatura Mondo" 1947, n-ro 3-4. Ĝi estas poemo el inter miaj preferataj, kaj verŝajne tial ĝi sin prezentis al mi kiel taŭga rimedo por mia satireto. Certe ne necesas emfazi, ke mia parodio tute ne mokas la originalon.

Por plene kompreni mian tekston, necesas iom ektoni la strangajn drinkleĝojn de Skotlando. Nome, en mia lando rajtas aĉeti alkoholaĵojn dimanĉe nur "bonfidaj vojaĝantoj", t. e., personoj kiuj efektive veturas de unu loko al alia. Sed soifuloj, kiuj veturas nur kelkajn mejlojn en la kamparon fariĝas (teorie) bonfidaj vojaĝantoj kaj rajtas aĉeti alkoholaĵajn trinkaĵojn. Sekve oni povas vidi ĉie en Skotlando, dum dimanĉ-vesperoj, aŭtobusojn plenplenajn de revenantaj "vojaĝantoj" pli aŭ malpli ebriaj.

ALMOZULA KANTO

Amiko mia, almozulo,
la vivo estas tamen ĝoj';
ni ambaŭ estas ja nur nulo,
sed por ni sonas hunda boj'.

kaj por ni ĉiutage flamas
en alto la brilanta sun',
nin ĉie tre afable amas
la ĉiam fidelega nun

kaj nin virin' rigardsalutas,
por ni sub sia bluzo lan'
ekscite kaj pekeme krutas
orngoforma, pinta mam'.

Por ni en ĉiu tago floras
milopaj ĝojo kaj konsol';
se ni ripozas aŭ laboras
ni ĉiam vivas kun fervor';

kaj kiam fine la vespero
sur ĉion falas kiel ret',
nin bonvenigas ĉe l' rivero
agrabla varma gastejet'.

Karolo Piĉ.

EBRIULA KANTO

Amikoj miaj, ebriuloj,
la vivo estas tamen fus",
se ni ne rajtas pro l' reguloj
levi pokalon al la bus';

kaj dum dimanĉoj nin minacas
turmento torda de soif',
nin eĉ la manĝoj tre agacas
pro manko de aperitiv'

kaj nin biero fantomadas,
por ni en febro de l' imag'
abunde fluas kaj kaskadas
likvoro ŝaĉima al stomak'.

Dimanĉe do ni forveturas
per aŭtobuso al kampar'
kaj tie sate nin saturas
fajfante pri la lega bar';

kaj kiam fine en vespero,
ni hojmeniras sen diskrct',
nin bonvenigas kun kolero
acerbe plenda edzinet'.

William Auld.

Debato

Esperantisto kaj soldato.

Mi legis kun granda intereso la diskuton inter la redaktoro de MR kaj sro J. W. Leslie. Kvankam mi estas nur komentanto kaj preskaŭ ne kuraĝas skribi al tia gazeto, kia estas MR, mi volas iomete respondi al la lasta frazo de sro Leslie en lia letero, kiu troviĝas en nro 4/1951, p. 20: "Kiom da esperantistoj fariĝis soldatoj? Kial?"

Mi povas citi nur mian propran sperton, sed eble tio donos klarigon pri la sinteno de iuj soldatoj rilate al esperanto. Mi ne estas esperantisto, kiu fariĝis soldato — male, mi estas profesia soldato, kiu fariĝis esperantisto. Kvankam mi estas (laŭ mia opinio) bona esperantisto, mi ankoraŭ povas fari mian devon kiel soldato.

Kiel? Tio baziĝas sur la premiso, ke soldatoj sendube militas, kiam necesas, sed nur malmultaj estas militistoj. La pli-

multo da soldatoj, precipe profesiaj soldatoj — kaj mi ne rajtas paroli pri alia speco — estas realistoj. Ili rigardas la mondon kaj vidas, ke ĝi estas malbona, maltrankvila, malfeliĉa. Do, ili preparas — preparas kontraŭ fulmomilito, perfidatado, kontraŭ malamiko, kiuj tute ne volas kunlabori en libera mondo. Sed la soldataro ne deziras militon. Ili preparas kontraŭ detruo de siaj hejmoj, lando kaj vivmaniero.

Tamen, kvankam la soldato preparas milite, mi konstatas, ke tio ne malhelpas lian kunlaboron por pli bona kaj feliĉa mondo. Li bone rekonas la neceson de paco — ankaŭ li pagas la impostojn sekvantajn el militpreparado. Ankaŭ li perdas la parencojn, kiam oni bombardas urbojn.

Do, ĉar mi mem rekonis la neceson de paco, mi esperantiĝis antaŭ unu jaro. Mi laboras por la paco sur la batalkampo de esperanto — sed samtempe mi laboras por paco plifortigante mian propran landon. Estas dirite, ke armiloj ne povas starigi pacon. Mi elkore konsentas — sed ne estaseble, ke unu duono de la mondo forĵetu la ŝildojn, dum la alia duono daŭrigas la konservadon de grandaj armeoj.

Tiel mi pravigas mian sintenon rilate al mia profesio kaj esperanto.

Kial mi fariĝis soldato? La kialo estas tre simpla. Mi batalis dum la tuta dua mondmilito. Kiam finiĝis la milito, mi sciis pli pri tiaj aferoj ol pri iu alia. La salajro estas sufiĉa, la vivmaniero agrabla kaj konvena al mi, kaj pro la kialoj supre diritaj, la laboro ne kontraŭstaras mian konsciencon.

Unu lastan punkton. Antaŭ nelonge generalo Eisenhower prelegis antaŭ aro da edukistoj — kie mi ne scias. Sed mi bone memoras lian lastan frazon. Li diris: "Estas via devo, sinjoroj, konstrui mondon, en kiu vi ne plu bezonos miajn servojn, en kiu mi ne plu havos laboron."

Tia estas la sinteno de la profesia soldato.

H. W. R. Petersen, kapitano,
Nov-Zelando.

*

Ĉu la mondo progresas?

Lastatempe okazis en la Londona Esperantoklubo debato pri la temo "Ĉu la mondo progresas".

Unue oni aranĝis la debaton por starigi novan programdetalon, kies ĉefa celo, kompreneble, estas praktiki (praktikigi) esperanton. La temo tamen montriĝis tre serioza, tiel serioza, ke ĝi meritas pli da pritrakto, ol kiom povas doni mallonga debato.

Mi tial opinias, ke estas bone raporti kelkajn el la ĉefaj punktoj de la debato, por ke la legantoj de Malgranda Revuo skribu siajn personajn opiniojn pri tiu grava temo.

La du ĉefaj parolantoj en la debato konfesis, ke ili estas lastmomentaj "devigataj volontuloj" ke ili vere ne havis sufiĉan tempon por prepari la argumentojn.

La proponinto de la temo diris, ke kiam li lastatempe aŭdis radian priskribon pri la dresado de junuloj en la "arto" de bajonetlukto, li ne povis ne demandi al si, ĉu la mondo progresas. Laŭ li, la daŭra ekzisto de militistaroj estas signo, ke la mondo ne progresas.

Ankaŭ tio, ke iuj homoj ekonomie dependas de aliaj homoj, estas signo de neprogreso.

Li priskribis la grandajn "kotpelvojn" de la mondo, kiujn kaŭzis la postuloj de la kontraŭsocia komerca, financa sistemo de la mondo, kaj asertis, ke jen estas alia signo de neprogreso. La intensa kulturado de la grundo per uzo de kemiaj sterkoj kune kun sensenca forigo de arboj grandskale preskaŭ endanĝerigas la nutrajprovizon por estontaj homoj. Por haltigi tion oni nun pli kaj pli uzas (ĉe sendependaj kulturistoj kaj amatoraj agronomoj tamen nur en malgranda skalo) la pli bonajn naturajn metodojn, kiujn iuj antikvaj rasoj uzis jam dum miloj da jaroj. En tiu fundamenta fako la homaro — la mondo — certe ne progresas, ĝenerale.

Li asertis, ke la mondo kiel tuto ne efektive suferas pro realaj mankoj. La sola manko estas tiu de aĉetopovo, kiun kaŭzas laŭcela plano de la internacia monopola monsisistemo. Estas signo de neprogreso, ke la homaro ankoraŭ estas regata tiel facile per la fipropagando de financistoj, kiuj regas la elektitajn popolajn registarojn. Ankaŭ en tio la mondo ne progresas.

Rilate al edukado (la klerigo), kaj en lernejoj kaj per la rimedoj de popola klerigo (radio, gazetaro k. c.) li asertis,

ke oni tro simpligas ĉion, anstataŭ eduki la homojn por vere pensadi kaj elpensadi.

Laŭ li la daŭra ekzisto de kancero kaj tuberkulozo (kaj aliaj mortigaj malsanoj) estas signo de neprogreso, kvankam li klarigis, ke ĉefe inter "civilizitaj" homoj ekzistas tiaj malsanoj.

Alia grava pruvo de neprogreso estas la moderna diigo de la ŝtato. La ŝtato estas organizo (ne organismo), kies sola racia motivo por ekzisto estas, ke ĝi servu al la individua homo. La vera celo de la vivo estas — vivi. La "oficiala" celo nuntempe estas "labori" (prefere "laboregi"), kiel en Sovetio kaj Usono.

Pensante pri la atombombo, ĉu oni povas aserti, ke la mondo progresas?

Kiam samideanino diris, ke oni progresas en la mondo, ĉar oni nun havas lavmaŝinojn k. s. en la hejmoj, la parolanto respondis, ke la vero estas, ke kvankam la mondo povas produkti tiajn maŝinojn por ĉiu virino, kiu bezonas aŭ deziras ilin, la granda plimulto de virinoj ne havas ilin, ĉar ekzistas artefarita manko de aĉetopovo — la plej trafa signo, ke la mondo ne progresas.

Jen do kelkaj punktoj el unuhora debato pri la temo. Kion pensas la legantoj de Malgranda Revuo? Ĉu, laŭ ili, la mondo ne progresas?

J. W. L.

Redakcia rimarkigo.

La supra diskuttemo estas tia, pri kiu homoj povas senfine paroli sen atingi iun ajn rezulton, se ne tiun ke la parolantoj mem pli fiksiĝas kaj eventuale fiksas iun alian al iuj certaj "opinioj". La temo, kiel indikas ĝin la titolo, ŝajnas al mi ne tre konvena por serioza diskutado. Ĝi estas same vasta kiel la homa ekzisto, kaj eĉ geniuloj verŝajne trovas, ke estas vane trakti ĝin en ĝia tuta amplekso.

Mi tamen akceptis la proponon pri aperigo. Eble ni povos almenaŭ lerni iom pri diskutado, eble ankaŭ prijuĝi iujn detalojn de la nuntempa homa vivo. Sed kontribuu al la dis-

kutado aŭ komentado ne per opinioj! Opinioj estas senvaloraj por vera diskutado. Oni devas doni konceptojn bazitajn sur faktoj kaj logika rezonado. Por povi formi tiajn konceptojn ni devas kiel eble plej precize difini la vortojn, kiujn ni uzas.

Ĉu la mondo progresas? Kion signifas la mondo? Verŝajne la homaro. Kion signifas la homaro? Verŝajne ĉiuj homoj sur la tero? Kion signifas progresi? Antaŭeniri al supera grado de disvolviĝo, diras Pl. V. Per disvolviĝo oni evidente komprenas perfekte. Sed kia perfekte?

Ne konsideru tian precizigon harfendado! Se mi diras, ke la homaro tre progresis dum la lastaj cent jaroj, la pli multaj homoj certe trovas tiun frazon tute korekta. Oni konstruis fervojojn, aŭtomobilojn, flugmaŝinojn, grandajn fabrikojn, inventis telefonon, gramofonon, radion, kinematografon kaj multe pli. Tiuj aferoj estas progreso, sed en si mem nur teknika. Ĉu tiu progreso estas teknika progreso de ĉiuj homoj sur la tero? (Mi ja diris, ke la homaro progresis.) Ĉu la teknika progreso alportas aŭ cbligas al ĉiuj homoj ankaŭ aliajn progresojn? Per teknika progreso de la homaro oni ordinare komprenas, almenaŭ grandparte, plibonigitajn vivkondiĉojn, pli multe da manĝaĵo kaj pli bonan, pli bonajn loĝejojn, pli da libertempo, distro, plezuro. Ĉu la progreso rilate al materiaj vivkondiĉoj estas la plej grava afero por la homoj, t. e. pli ol io alia donas senceon al ilia vivo, aŭ ĉu ekzistas progresoj, kiuj estas en si mem pli valoraj? Se jes, ĉu la unua kaj la aliaj havas ian rilaton inter si?

La enhavo de la vorto progreso tamen ne estas elĉerpita. De kie venas la progresemo en la homoj, aŭ kio ĝi estas? Kio estas ĝia senco? — La senco de la vivo estas — vivi, diris la diskutanto en Londono. Kion signifas en tiu frazo la vorto vivi?

Krome estas necese por tia diskuto eltrovi, ĉu niaj diversaj konceptoj pri progreso estas ĝenerale validaj por ĉiuj homoj. Certe ĉiuj homoj deziras kontentige da manĝaĵo, kontentigan loĝejon ktp. Kiu aliaj progreskonceptoj estas ĝenerale validaj por ĉiuj homoj?

Kaj ni povas demandi, kio estas la celo de tia diskuto. Certe ne nur konstati, ke estas tiel aŭ tiel, sed eltrovi, kio estas

esenca en progreso, kaj akceli esencan progreson. Kaj ĉu la progreso estas esence afero tuthomara aŭ individua?

Per la supraj, senplane elĵetitaj demandoj mi celis nur sugesti la vastecon de la temo kaj la gravecon de difinado kaj klaraj konceptoj.

S. Engholm.

Literaturo

Johan Hammond Rosbach: Bagatelaro.
Eldonis Esperantoforlaget A/S, Oslo.
Prezo: 7 norv. kr.

En antaŭparolo nomata Averta la aŭtoro diras, ke la ĉefa celo de la libro estas doni facilan kaj varian legmaterialon al samideanoj, kiuj ne plu estas puraj komencantoj. Tiun taskon la libro tre bone plenumas. Rosbach estas lerta kaj sperta Cseh-metoda instruisto, kaj li scias esprimi sin tiel, ke ankaŭ novaj adeptoj de la lingvo facile komprenas.

Tio tamen estas flanka afero. Unualoke la libro meritas atenton pro siaj literaturaj kvalitoj. Tiuj estas evidentaj, sed ĝuste prijuĝi ilin estas afero parte ne facila. Ŝajnas al mi, ke en la rakontoj — estas dekkvin rakontoj kaj ses poemoj en la volumo — mankas io, kio estas esenca por vera rakonto, io, kio donas animon kaj memstaran vivon. Por ke rakonto fariĝu vera rakonto, la aŭtoro devas travivi ĝin, trovi ĝiajn okazojn kaj personojn same gravaj kiel personojn kaj okazojn en la reala vivo aŭ eĉ pli. Povas esti, ke tio ne estas tute plenumita. La aŭtoro rakontas por distri, por ĝajigi, por pensigi kaj kortuŝi legantojn, kiel rakontisto kun tia celo rakontas al sia publiko. Eĉ en la lasta rakonto, Anna Maria, kie oni sentas la venton de literatura alto, ŝajnas al mi, ke estas ioma tia manko aŭ ke kunestas io superflua, kio ĝenas la puran impreson. Sed tute certa mi ne estas. Povas esti ke mi parte misjuĝas kaj tro malalte taksas.

La aŭtoro efektive povas respondi al miaj rimarkigoj, ke li ne havas literaturajn pretendojn kaj ke miaj supraj rimarkigoj tute ne estas bezonataj. Tiuokaze mi devas diri, ke la

evidentaj literaturaj kvalitoj de la libro devigas min kiel recenziston paroli serioze kaj sincere pri ĝi ĝuste el literatura vidpunkto. Kaj jen mi daŭrigos per la kvalitoj, pri kiuj mi estas plene certa.

Rosbach estas eminenta rakontisto. Jen la komenco de unu el la rakontoj: "Mi staris sur la ferdeko kaj manĝis ĉerizojn, kiam la ŝipo proksimiĝis al la kajo de la bela turistloko apud Sognefjordo. Estis unu el la ĉefaj amuzoj de la loĝantaro rigardi la ŝipon kaj la alvenantajn turistojn — tial multkapa homamaso bruis kelkcent metrojn for de la ŝipo. Kiam la ŝipo ankoraŭ pli alproksimiĝis, mi povis klare diferencigi la vizaĝojn de homoj, kaj unu el la unuaj, kiujn mi ekvidis, estis li, la vendisto de ŝulaĉoj." — Tia komencan de rakonto faras nur tiu verkisto, kiu multe kaj konscie laboris por akiri kiel eble plej perfektan rakontmanieron aŭ kiu havas grandan naturdoton por rakontado plus ne malmulte da konscia laboro pri sia stilo. — Au: "Jam mia patro diris al mi, ke mi havas la feliĉan povon travivi ion eĉ dum kelkaj momentoj, kiam la vagonaro haltas ĉe malgranda stacio meze en la arbaro. Eble. Mi almenaŭ preskaŭ ĉiam ion travivas. Mi ŝatas vidi. Mi ŝatas piediri laŭ mallarĝaj vojetoj inter ŝtonegoj kaj arbetoj, inter marĉoj kaj lagoj. Mi ŝatas la panoramon el la alta montpinto: aliaj montoj leviĝas unu malantaŭ la alia, lagoj kristale brilas — la pejzaĝo senfine etendiĝas..."

Tia estas lia stilo. Li klare distingas la impresokreajn kaj rakontokonstruajn detalojn kaj sen rimarkebla peno kaj cerbumado redonas ilin per perfekte adekvataj vortoj. Ĉiam li trovas kontentige da detaloj kaj okazoj — tamen ne uzas tro multajn — kaj scias aranĝi ilin en la ĝusta maniero, kaj ĉiam liaj propozicioj kaj frazoj havas tiun intenson kaj tiun dinamikon en la sinsekvo, kiu oni trovas nur en tre altnivela stilo. Ĉiu frazo nepre kaptas la intereson de la leganto.

Tiuj kvalitoj troviĝas ankaŭ en liaj versaĵoj, kiuj estas fabloj. La plej bonaj el ili havas iom de la viva freŝeco de la fabloj de La Fontaine. La ŝercajn ne havas literaturan valoron, sed kompreneble ili bone taŭgas por la celo indikita en la enkonduko.

Mi vidas, ke mi nenion menciis pri la okazoj en la rakontoj.

Nu, kiel mi diris, la rakontoj estas distraj, gajigaj, pensigaj kaj kortuŝaj, ili estas tre variaj kaj oni legas ilin kun streĉita intereso. La ceteron vi mem eltrovu.

Jen do libro, kiu povas interesi ĉiujn, de komencantoj kaj aliaj homoj, kiuj legas por lernado aŭ distro, ĝis legantoj kun ekskluzive literaturaj intereso. Se la esperantistoj estas tiel multaj, kiel oni asertas, kaj se ili havas tiom da intereso por sia lingvo kaj ĝia evoluo, kiom ili pretendas, ili devus en unu-du jaroj aĉeti almenaŭ dek mil ekzemplerojn de tiu ĉi libro. Lasante la bonajn librojn sur la bretoj de la eldonejoj vi mortigos la krecan entuziasmon de talentaj verkistoj kaj malhelpos la evoluon de la lingvo kaj la movado.

"Pli aĝa" certe estas pli bona ol "pli maljuna", kiam temas pri knabo (p. 18). "Subkonscienca" estas korektinda skribcraro por "subkonscia" (p. 92). Dudeko da preseraroj iom malbeligas la tekston sed neniel malhelpas legadon.

S. E.

R. M. Ballantyne: La hundo Kruso.
Trad. J. M. Inman.
Eld. The Esperanto Publishing Company.
Prezo: 3 ŝil., afr. 3 p.

Tiu ĉi libro aperis en 1860. Ĝi estas t. n. indianlibro kaj priskribas la aventurojn de tri ĉasistoj kaj hundo. La aŭtoro bone konis la medion de sia rakonto, kaj la pioniroj mem kaj la okazoj ŝajnas pli realofidelaj ol en multaj postaj indianlibroj kreitaj preskaŭ sendepende de la reala vivo. Tiu ĉi eldono tamen estas mallongigo, kaj la originalon mi ne legis. Tial mi ne povas diri ion definitivan pri la kvalitoj de la verko.

La esperanta lingvo ne estas bona. Vortoj kiel forteco, dankemeco, herbeca stepo ktp ŝajnas arkaikaj. Pli ĝenas frazo de jena aspekto: "La loĝejo estis pli bona ol li atendis precipe kiam fajro vaporigis varman sukerakvon apud siaj piedoj." (76). La verbotempoj kelkfoje ŝajnas ne logike uzitaj, ekz: "Pluraj aliaj bandoj, kiuj estis poste renkontitaj, estis egale amikemaj" (131). "Fine ĝi (t.e. la tondo) atingiĝis" (89) kaj "ili murdiĝis dum dormado" (135) ne estas aprobinda esperanto. Ofte adverbo estas uzata, kie adjektivo estus pli ĝusta aŭ la

sola ĝusta esprimo, ekz: "kiuj (t. e. indianoj) aspektis tiel balateme" (134). En kelkaj lokoj la angla then estas tradukita per tiam anstataŭ poste, eraro ne malofta en tradukoj el la angla. En iuj lokoj la interpunkcio estas iom stranga. — "Venu Kruso, venu:" estis tro malfrue, la hundo bojis... (70) — Li daŭrigis, "certe, hundo, ni loĝos longe tie ĉi" ... (82). "Blokhaŭso" ŝajnas superflua vorto.

Ĝenerale la lingvo estas iom rigida, kun multe da mallerte faritaj vortoj kaj esprimoj. Komencantoj, kiuj legas ĝin, ofte bezonas helpon de lertaj esperantistoj. Kelkaj rigidaj desegnoj malmulte stimulas la fantazion.

S. E.

Hasegawa Teru: En Ĉinio batalanta.
Eld. Esperanto-Tusinsya, Osaka.
Prezo: 100 jenoj.

Aŭskultu la voĉojn de oceano!
— Postrestigitaj skribaĵoj de militmortintaj studentoj en Japanio —
Eld. Kasai Ligo de esperantaj grupoj, ĉe Kita Satori, Kitaogimati 72, Kita-ku, OSAKA, Japan.
Prezo ne montrita.
Ambaŭ libroj mendeblaj ĉe Kansai Ligo.

La unua el la supraj du libroj aperis en Ĉungking 1945. Anstataŭ la supra aŭtonomo troviĝis sur ĝi la plumnomo Midorikawa Hideko. Tiu eldono estas elĉerpita. Esperantistoj en Osaka reeldonis la libron la 15an de decembro 1951. Tiu ĉi teksto estas maŝinskribita kaj multobligita, sed tio ne ĝenas la legadon. La paĝoj estas ne tro grandaj kaj la reproduktado estas bona.

Pri Hasegawa Teru skribis al mi japana samideano: "Laŭ mia opinio ŝi estis la plej elstare talentplena el ĉiuj japanaj esperantistoj. Ŝi kontribuis multe al Esperanta literaturo per siaj verkoj kaj tradukoj. Ŝi travivis sian tutan vivon kiel vera pacbatalanto kaj eĉ oferis sian vivon por liberigo de la ĉina popolo kontraŭ japana invado."

La aŭtorino komencas sian rakontadon en aprilo 1937, en la momento, kiam ŝi en Jokohama suriras ŝipon, kiu portos ŝin al Ŝanhajo. Tie atendas ŝin ŝia edzo, ĉina esperantisto, kiu pli frue vizitis Japanujon. La ĉinan lingvon ŝi lute ne

konis, kaj ŝia edziniĝo kun ĉino kaj foriro al Ĉinujo estis por ŝi minimume same gravsignifa kiel la kontraŭtradicia ribelo de junaj virinoj en Eŭropo en la mezo de la pasinta jarcento.

Ŝi rakontas pri la vivo en ŝanghajo, pri la fuĝo suden, pri la vivo en Kanton, kaj fine, en postskribo, mencias pri sia dua periodo en Ĉinujo, en Ĉungking.

Ŝi rakontas klare kaj vivplene, ŝi estas vastmensa kaj grandanima, ŝiaj konceptoj estas homecaj kaj universalaj. Inter ŝia rakonto kaj aliaj fidelaj rakontoj pri la sama temo estas la sama diferenco kiel inter vojaĝo en fremlando per fremda lingvo kaj alilanda vojaĝo per esperanto. Vi vivas kun ŝi kiel samlingvano, kiel homo kun homo de la sama speco. —

La dua libro, kiu estas presita, estis la plej multe vendita libro en Japanujo en 1948. Ĝia titolo estas prenita el japana poemo. Mi ne estas certa pri la vera signifo de la esprimo, sed ĉiokaze tiuj leteroj, postlasitaj de japanaj studentoj mortintaj en la milito, estas voĉoj vokantaj super la tuta vasta oceano de la homara vivo, Por la potenco ili estis oferataj en la ekfloro de sia vivo, same kiel milionoj da aliaj. "Ni devas oferi senrekompence ne nur la korpon sed ankaŭ lasi al la milito deŝiri eĉ la homecon, kiu estas al mi la plej kara." Tiuj voĉoj, ne ĉiam rekte sed per la enhavo de la vortoj, vokas super la vasto de la oceano: Neniu rajtas subpremi la homecon kaj fordoni la vivon de alia.

La traduko en multaj lokoj estas ne bona. Ne gravas. Tie ĉi la formo de la vortoj malmulte gravas kompare kun la spirito, kaj ĝia lingvo ne havas makulojn.

Mi sincere petas ĉiujn eldonejojn kaj libroservojn: Nepre havigu tiujn du librojn! Mi petas ĉiujn esperantistojn: Nepre aĉetu kaj legu tiujn librojn! Ĉe multaj homoj, kaj foje eĉ ĉe esperantistoj, troviĝas strangaj kaj foje tute groteskaj konceptoj pri alilandaj homoj. Tiuj ĉi libroj nepre konvinkos vin, ke la japanoj estas homoj kiel vi mem. Ili ne kaŝas, ke inter la japanoj troviĝis malbonaj homoj kaj eĉ monstroj. Sed tiaj troviĝas aŭ povas aperi ankaŭ en aliaj landaj. Sed vi ĝojos, ke tiom da homeco kaj tiom da bono troviĝas ankaŭ ĉe la japanoj, ne malpli ol ĉe vi mem. Kaj ĉu ni ne faru ĉion, kion

ni povas, por kunigi ĉiujn bonajn fortojn en la mondo? En Japanujo ŝajne troviĝas miloj kaj miloj da homoj, kiuj en esperanto vidas ilon por kontakto kun homecaj homoj en la tuta cetera mondo, kaj ili deziras tian kontakton. Se ni plenumas tiun deziron, ni donas al ili grandan moralan helpon en ilia spirita konstrulaboro. Kiom multaj el ni havas iom da intereso por la japanoj, kiom multaj el dudek mil esperantistoj korespondas kun japanoj? Niaj pensoj kaj agoj malmulte signifas en la tutmonda okazado. Tamen, se ni per niaj pensoj kaj agoj povas doni iom da senco al nia propra vivo kaj krome helpi ankaŭ al aliaj ricevi sencion en sia vivo, ni akiras pli multe ol la homoj ordinare akiras.

*

Preskaŭ samtempe kun la supre menciitaj japanaj libroj MR ricevis revuon eldonitan de la sama entrepreno, kiu eldonas la monatan gazeton Samideano (preskaŭ nur japanlingva):

Kajero socia, 3, vintro 1951.
Speciala numero pri la repaciĝo.
Eld. Esperanto-tomo-no-kai, 6 — 672 Koenzi
Suginami-ku, Tokio.
Prezo: 50 jenoj.

La kajero estas 60paĝa, maŝinskribita kaj bone reproduktita. La ĉefa parto de ĝia enhavo konsistas el enketrespondoj de japanaj universitataj profesoroj kaj aliaj eminentaj japanaj kulturpersonoj pri la japana repaciĝo. La tradukitaj eldiroj estas elektitaj el kvaroble pli granda kolekto. La eldiroj estas interesaj kaj atentindaj atestoj pri japanaj konceptoj pri repaciĝo. En sia pacodeziro ili certe reprezentas la tutan japanan popolon, sed estas malfacile diri, ĉu la kajero en ĉio reprezentas la ĝeneralan japanan pensmanieron. Ni seninstrue komprenas, ke la politika situacio de Japanujo estas malagraba kaj malfacila. Antaŭ nelonge sro Dulles diris, ke Usono ne povos halti, kiam ankoraŭ troviĝas komunisma regado en Ĉinujo. Mi tre dubas, ke tiuj vortoj reprezentas la ĝeneralan uzonan pensmanieron. Ĉiu popolo rajtas vivi laŭ sia maniero, kondiĉe ke ĝi ne altrudas ĝin al aliaj aŭ per ĝi faras malbonon

al aliaj. Ĉiokaze Japanujo estas dependa de lando, kie tiuj vortoj estis publike dirataj. Kaj aliflanke Sovetio pli ol iu alia lando en la mondo parolas pri paco.

En la enkonduko de la kajero troviĝas Deklaracio pri la mondpaco, en kiu "Ni, esperantistoj, kiuj sin gvidas per la ideo de la tutmonda paco kaj frateco, deklaras en la nomo de la 38a Japana Kongreso de Esp. jene: 1. Ni ĵuras labori kun pli da energio kaj sindoneco en la disvastigo de Esp.,... por akceli la efektiviĝon de intergenta frateco, kaj sekve, la mondpaco."

Tiu rezolucio, subskribita de "Japanaj aktivuloj de la XXXVIII Japana Esperantista Kongreso", finiĝas jene:

1e: Nova internacio esperantista estas necesega, ĉar nek UEA nek SAT klopodas por mondpaco, kontraŭe ili laboras kiel agentoj de l' imperiismo propagandante aŭ kosmopolitismon, aŭ sennaciismon.

2e: Nova internacio esperantista estu organizita per amasa diskutado internacia, per amasa kunbatalo, kaj persista malkovrado de l' karakteroj de UEA kaj SAT." —

La homoj estas diversaj. Tiamaniere la Japanaj Aktivuloj laboras por la paco. Estus interese ekscii, kiom multaj el ĉiuj japanaj esperantistoj estas Japanaj aktivuloj.

S. E.

Jarlibro de UEA 1952, unua parto.
Neaĉetebla, ricevebla nur de individuaj membroj de UEA.

UEA, tiu plej forta esperantista agentejo de imperiismo — laŭ la supre cititaj japanaj aktivuloj — laboras fervore kaj en tiu ĉi jaro aperigis sian jarlibron tuj en la komenco de la jaro. Krom la listo de delegitoj ĝi havas ĉirkaŭ 100 paĝojn pri ĉiuj imperiismaj agadformoj kaj agadkampoj de la organizo, kaj ĝi ŝajnas necesa gvidlibro por ĉiu, kiu volas labori por persista malkovrado de la karaktero de UEA.

S. E.

Sennacieca Revuo, nro 80.
Eld. SAT, Paris.
Prezo: 200 fr. fr.

Sennacieca Revuo reaparis per kajero ĉ. 60paĝa kaj en formato 18×22,5 cm. La ekonomiaj cirkonstancoj ne permesas oftan aperigon, kaj tial oni en la nuna jaro eldonas nur tiun numeron. La artikoloj estas multaj, diverstemaj, kontentige ampleksaj kaj nepre meritas legadon kaj pripensadon. Jen sugestoj pri la riĉa enhavo: — Lucien Lauriat: 1951... la epoko de granda angoro kaj de triumfanta ŝovinismo — H.W. Alings: ŝparo kaj malŝparo — R. Burnazel: La ŝafoj kaj LI — Olaf Solli: Ekonomia kunlaboro en Skandinavio — Raymond Schwartz: Laŭ mia ridpunkto — Ben Alter Jeŝiel: Izraelio kaj ĝiaj problemoj — F. Szilágyi: La batalanta spirito — Pär Lagerkvist — G. Waringhien: Eugeno Lanti — Marcelo Leereveld: La komplikeco de sociaj problemoj — J. Régulo Pérez: Estiĝo kaj rolo de la iberiaj lingvoj — F. Barronet: Kial la laika problemoj fariĝis la plej grava en la franca politiko — Sigmund Freud — La mirinda povo de la kortizono — D-ro A. Mildwurf: Georgo Sorel — Kiuj okazoj signis la Esperanto-movadon en 1951? — R. Laval: Pri propraj nomoj. Krome troviĝas kelkaj poemoj.

SANKTA IGNACIO DE LOYOLA: *Spiritaj ekzercoj*. Rekte tradukitaj el la hispana originalo, laŭ eldono de "El Mensajero del Corazón de Jesús", far' de Eŭna. — Zaragoza, Hispanujo, 1952. — 206 paĝoj. — Prezo: 3.— steloj.

Jen ni staras antaŭ esperanta traduko de la *Ejercicios espirituales* de Ignacio de Loyola, pli konataj tutmonde sub sia latina nomo *Exercitia spiritualia*, verko pri kiu asertis L. Böhmer, ke ĝi estas unu el la libroj de la nomaro de Dio antaŭdestinitaj al la gloro. Dum dudek ses jaroj laboris Ignacio super tiu verko de simpla, kurta, seka esprimo. La aŭtoro ne estis virtuozo de sia verkatofo; lia psikologio ne estis tiu de poeto aŭ scienculo; nur praktika homo li estis. Tiel la *Ekzercoj* ne estas facilega libro; ankaŭ ne edifa, eĉ ne traktajo pri asketaĵoj aŭ piaj meditadoj; ĝi estas nur regularo pri ekzercoj.

Por ke tiuj ekzercoj plene efiku, ne sufiĉas simpla legado; necesas, ke oni sin submetu al ili sen ia ajn korpa aŭ mensa kontraŭstaro, laŭ la intenco de la verkinto, sub gvido de priafera spertulo. Tia estas la fakta vero, kaj neniel valoras kontraŭargumenti, kvankam verŝajnas, ke la plimulto de la legantaro de ĉi tiu recenzo, ironie dankante, rifuzos akiri scion pri la ekzercoj, laŭ propra sperto...

Ignacio, eksmilitisto, transigis al la spirita mondo la principojn de la milita eduko. Tial la *Ekzercoj* ne bazigas en la ebloj de memedukado, sed ili devas ekzercigi sub majstra, sperta gvidado. La animstato de la gvidato, dum la ekzercoj, devas aperi tute klara ne nur al ĉi ties vido sed ankaŭ al tiu de ties mentoro; la anima osciloj devas esti al ambaŭ tiel nete videblaj, kiel la movado de la radaro en aperta horloĝo. Sed samtempe la ekzercanto restas tute libera for de sia gvidanto, pro tio, ke ĉi tiu sin tenas for de kiu ajn influo kaj li devas nur regulligi, per firma mano, la disvolvigon de la sentoj; la tasko de la gvidanto konsistas nur en la zorgo pri la akurata plenumado, per la ardo de sia viva vorto, de la kadro de la ekzercoj, kaj ordoni, eduki, ardigi aŭ submeti, laŭkonvene, la imagon de la gvidato; resume: la spiritaj elmovoĵ devas eliri el la temo mem de la ekzercoj, kaj al la gvidanto nur koncernas ilin sperte kanalligi al la celo.

Ignacio ne pretendis fari monaĥejon el la mondo, sed krei helpilon al laikoj, al ĉenitoj al eksterreligiaj profesioj, pro tio, ke ĉio tera nur valoras, nur gravas *sub specie aeternitatis*. Ĉi tiu nova kompreno de la asketismo, kiu profundigis kiel neniu alia la religian meditado, kiu estis lumturo kaj apogo por ĉiuj turmentitoj de "la angoro pro la animo" — tiu kompreno estis kiu instruis la grandajn hispanajn poetojn kaj pensulojn pripensi la transmondon, mediti la problemojn de la peko kaj de ties elpago, la pravigon de la graco, la ekvilibron inter tiu ĉi vivo kaj la transa.

Neniu alia modernepoka libro estis tiom grava, kun komenca, duma kaj gisdata efiko. Ne estas do mirinde, ke Lenin, alia patro de la homaro, funde studis tiun verkon kaj ties ĉefsekvon, la Societas Iesu, al kiu multokaze tre similas la aganta komunismo soveta. Kaj ankaŭ la semantika paralelo, laŭ kiu, post la rekta senco, *jesuito* kromsignifas "timindan hipokritulon" kaj *komunisto* "statan perfidulon", estas pensiga kolcido! Des pli, se oni konsideras, ke la religian ordonon de la jezuitoj proskribis per speciala kaj eĉ en sia fundamenta leĝaro multaj ŝtatoj, ekzemple la nunaj "okcidentaj" Svislando kaj Norvegujo, ktp, kiel iam — kun posta reallaso — Portugalujo, Hispanujo, Francujo, ktp kaj eĉ Vatikano mem, kiu mallongan tempon nuligis la ordonon!

La tradukon, faritan de lerta hispana esperantisto, kiu humile kaj modeste sin kaŝnomas Eŭma — psŭdonimo, cetere bone konata al hispanoj —, mi trovas ĝenerale bona, kvankam tie kaj tie troviĝas malglataĵoj — je kiuj ankaŭ ja ne senas la originalo mem. La sintenon de la tradukinto ne kompari sian laboron kun alilingvaj interpretoj, eĉ se teorie pravigebla, mi, cele al la glateco kaj klarco, kiuj devas ornamati ĉiun esperantajon, ne povas aprobi. Malgraŭ tio, samideano Eŭma faris bonegan kaj ĉiel laŭdindan laboron — kaj ne malĉefe pro la fakto, ke ĝin faris, nun, hispano, en Hispanujo mem —, al kiu oni povas nur esti tre danka.

La preserara koboldo ankaŭ faris sian laboron, eĉ se ne troe. Preso, papero kaj bindo mezkvalitaj.

J. Régulo Pérez
Kanariaj Insuloj